

Ilona Koutny

Universitato Adam Mickiewicz, Poznań, Pollando

Morfologio de Esperanto

Resumo: En la lingvistika priskribo de Esperanto morfologio estas speciale grava: unuflanke la senŝangaj morfemoj kaj la produktiva, regula vortfarado signifas avantaĝon, sed aliflanke tie kaŝiĝas ankaŭ problemoj pri kiuj esperantologoj delonge diskutas kaj povas esti interesaj ankaŭ al ĝenerala lingvistiko, nome la fifama radikkaraktero. La artikolo donas superrigardon pri la tereno de esperanta morfologio, ekde la difino kaj klasifiko de morfemoj tra la problemoj de vortfarado (derivado kaj kunmeto) ĝis la vortstrukturo kaj difino vortospecoj. La tipologia loko de Esperanto inter la naturaj lingvoj finas la prezenton. Analizatas diversaj aliroj al morfemoj kiel tiuj de la Akademio de Esperanto, Szerdahelyi ĝis la plej nova de Jansen. La aŭtorino mem proponas pluevoluigon.

Ŝlosilvortoj: esperantologio; morfemklasifiko; vortfarado; vortospecoj; tipologio

1 Enkonduko

Estas ofte akceptata far esperantologoj ke Esperanto – kreita artefarite – jam funkcias kiel **natura lingvo** (Schubert 1989; Blanke 2001; Lindstedt 2006; Koutny 2015; Stria 2015 ktp.). Ĝi kapablas esprimi pensojn kaj sentojn de siaj parolantoj, doni identecon al ili. Ĝi disvolviĝas en memelektita parolkomunumo, kaj servas unuavice la *internacian komunikadon*. Liu (2011) pruvis per kvanta analizo, ke strukture Esperanto estas normala homa lingvo. Pro tio ĝia analizo eblas simile al tiu de naturaj lingvoj. Esperanta lingvistiko havas la taskon trovi en kio ĝi montras trajtojn similajn al tiuj de naturaj/etnaj lingvoj kaj en kio specifajn. Parkvall (2010) kaj Koutny (2015) esploris la lokon de Esperanto en la tipologio de naturaj lingvoj. Ni vidu nun pli proksime la terenon de vortkonstruo!

Morfologio aŭ **morfemiko** (kiel Szerdahelyi 2024 uzis ĝin) okupiĝas pri la strukturo de vortoj, pri formo, klasifiko kaj kombiniĝo de bazaj lingvaj elementoj, vorteroj, tiel nomataj morfemoj. **Morfemoj** estas la minimumaj unuoj de signifo (leksika aŭ gramatika). Estas kutime dividi ilin en **liberajn** kaj **ligitajn** morfemojn. Plej ofte la bazaj vortoj en etnaj lingvoj estas liberaj morfemoj, do ili povas memstare aperi en frazo (ekz. en la angla *table*, *speak*, *good*, *two*, *in*, *and* ktp.; en la franca *table*, *parler*, *bon*, *deux*, *dans*, *et* ktp.; en la

pola *stót, mówić, dobry, dwa, w, i* ktp.). La ligitaj morfemoj nur kombinite kun iu alia vortero povas aperi en frazo (*tabl-, parol-* ktp. aŭ la pola *dobr-*). Tipe la afiksoj estas tiaj morfemoj kiuj servas por krei aliajn vortojn (derivitajn vortojn) aŭ vortformojn. La antaŭaj deriviloj nomiĝas prefiksoj kaj la postaj deriviloj sufiksoj. Por lingvo kun riĉa morfologio kiel ekz. la aglutina hungara lingvo, la vortfaraj/derivaj morfemoj kaj la sintaksaj/fleksiaj morfermoj (kiuj kapabligas la vortojn funkcii en frazoj) estas uzataj du kategorioj: afiksoj kaj finaĵoj aŭ derivaj kaj fleksiaj afiksoj.

En la sekvaj subĉapitroj la multe diskutata esperanta morfema sistemo estos prezentata, poste la derivado kaj kunmetado diskutataj, sekve la esperantaj vortostrukturo kaj vortospecoj difinataj, fine la loko de Esperanto laŭ la morfologia tipologio. Mi komparos Esperanton kun lingvoj kiujn mi konas por montri ĝian lokon kaj ke ĝi bone povas ponti inter lingvoj pro sia fleksebleco. Krom la hind-eŭropaj lingvoj (Fr: franca, latinida lingvo; De: germana kaj En: angla, ĝermanaj lingvoj; Pl: pola, slava lingvo) mi uzos la hungaran (Hu, finn-ugra, mia gepatra lingvo) kaj sporade referencas al aziaj lingvoj kiel la ĉina (Zh, petante helpon de Al).


2 Gramatika aliro al la klasifiko de la esperantaj morfemoj

2.1 Morfemklasifiko laŭ Zamenhof

Zamenhof ankoraŭ ne konis la nocion de morfemo, li parolis pri vortoj kiel bazaj elementoj de sia lingvo kiujn li konsideris senŝanĝaj:

Mi aranĝis plenan *dismembrigon* de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el *senŝanĝaj* vortoj. ... Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj k.t.p. estas esprimataj per la kunigo de senŝanĝaj vortoj. (Zamenhof 1887)


El lia aliro la morfemoj (tion ni uzas jam anstataŭ “vortoj”) sekvas la divido (kp. Rokicki 1987) kiun oni uzas tradicie en la lernolibroj:



Bildo 1: Morfemklasifiko laŭ Zamenhof

2.2 Morfemklasifiko laŭ Szerdahelyi

Szerdahelyi (1976a, 2024; Koutny 2025) pli precizigis tiun ĉi dividon farante pluan dividon en la menciitaj kategorioj. Nome la **radikoj** (kiuj havas semantikan enhavon) povas esti memstaraj, t.e. liberaj, aŭ finaĵbezonaĵ, t.e. ligitaj. La **afiksoj** estas prefiksoj aŭ sufiksoj. La **finajĵoj** (kiuj havas funkcia/gramatika signifon), dividiĝas al vortigaj finaĵoj (vortospecaj kiuj faras el la finaĵbezonaĵ radikoj vortojn) kaj kategoriaj kiel la akuzativa finaĵo.



Bildo 2: Morfemklasifiko laŭ Szerdahelyi

Tiu ĉi sistemo estas konvena por instrui Esperanton kaj ankaŭ nun estas uzata. Analogioj troveblas kun aliaj lingvoj. La diferenco estas ke la bazaj elementoj de Esperanto estas ne vortoj, sed **radikoj** kiuj – krom la **fermitaj klasoj** de numeraloj, simplaj adverboj, pronomoj, prepozicioj, artikolo, konjunkcioj kaj subjunkcioj, partikuloj, interjekcioj – bezonas vortigan finaĵon. Kutime la radikoj preferas vortiĝi pli ofte en iu specifa vortospeco kiel substantivo (ekz. tabl- > *tablo*), verbo (ekz. parol- > *paroli*) kaj adjektivo (bon- > *bona*), sed ankaŭ en la aliaj kategorioj ili povas aperi (*bono, boni, bone; parolo, parola, parole*). Tion subtenas ankaŭ la statistika esploro de Jansen (2024). La unuajn Szerdahelyi nomas *primaraj vortoj* (1976a, 2024). Ne ĉiam evidentas kiu estas la primara vorto, ekz. ĉu *biciklo* aŭ *bicikli*, *truo* aŭ *trui*. Krome li konstatis ke Zamenhof transprenis el siaj fontolingvoj ne radikojn, ja ili tie ne ĉiam ekzistas, sed vortojn, el kiuj li poste ekstraktis la radikojn. La reduktitan signifon tamen influas ofte la slavaj lingvoj (rusa, pola). Pro tio ili diferencas laŭ sia karaktero kaj funkciado en la vortfarado.

Afiksoj troviĝas ankaŭ en la hind-eŭropaj lingvoj, nur ke ili ne estas tiom konsekvence uzataj kiel en Esperanto: ne ĉiam ili funkcias aŭ estas pluraj afiksoj por la sama celo. Ekz. por la esperanta *ec-* la angla havas *-ty* en *modern* > *modernity*, *-ness* en *ready* > *readiness*, *-ce* en *intelligent* > *intelligence*, *-ship* en *friend* > *friendship*, sed povas esti eĉ tute alia vorto kiel *height* por alteco (ne el *tall*, sed el *high*). Zamenhof mem pruntis afiksojn el la far li konataj lingvoj, ekz. *in-* el la germana, *mal-* el la franca, *ist-* internacia (originon de aliaj afiksoj vidu en Waringhien 1959 en Planchon 2025). Do, Zamenhof ne kreis iun tute novan sistemon por Esperanto, sed transprenis la elementojn el ekzistantaj lingvoj (vd. Szerdahelyi 2024 parolante pri la semantika sistemo de Esperanto) kaj ĝeneraligis ilin (Koutny 2015, 2018). Ankaŭ tio kontribuas al ĝia natureco. La afiksoj ĉiam funkcias, nur la semantiko limigas ilian uzon.

La vortigaj **finaĵoj** kreas vortojn el la radikoj kaj nur vortoj povas havi vortospecon, ne radikoj – emfazas Szerdahelyi (1976b, 2024). La diversaj vortospecoj povas havi diversajn kategoriojn, kiel la substantivo pluralon kaj kazon (nominativon kaj akuzativon en Esperanto).

2.3 Gramatika radikkaraktero de AdE (laŭ René de Saussure)

Nefeliĉe, en la diverslingvaj versioj de la Unua libro (Zamenhof 1887) kaj same en la *Fundamento* (Zamenhof 1905), la vortlisto egaligas la esperantajn radikojn al vortoj en la aliaj lingvoj (rusa, germana, franca, pola kaj angla) kiuj cetere inter si ne egalas. Tio kaŭzis la kredon ke la radikoj havas gramatikan karakteron. René de Saussure (1910) kreis ĉirkaŭ tio teorion kiun la Akademio de Esperanto akceptis kaj la *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto* de Kalocsay kaj Waringhien (1980) transprenis. Tiu aliro ŝajnis solvi la problemon: kial estas diferenco en la vortfarado, ekz. kial iu radikoj baze esprimas ilon kaj alia bezonas la afikson *-il* por tio (temas pri la fifama problemo de *broso* kaj *kombilo*).

AdE eĉ asignis al ĉiuj morfemoj – radikoj, afiksoj kaj finaĵoj (!) – verban, substantivan aŭ adjektivan karakteron (Aktoj 1968). Tion Rokicki (1987) konsideras tute prave malunueca kaj nekohera (la morfemdividon de AdE vidu en lia artikolo). Li prenas kiel bazan kriterion la ligeblecon de la morfemoj kiuj gvidas al neegala divido, ja en la neligebla grupo restas la artikolo, partikuloj, la konjunkcioj kaj subjunkcioj, praktike ĉiuj aliaj morfemoj kapablas ligiĝi, eĉ se limigite (mia, dua, duono, peri, eki, eko, vei).

2.4 Radikkaraktero en ĝeneralaj gramatikoj

Wells ne okupiĝas pri la problemoj en sia *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto* (1978). Gledhill en sia anglalingva lingvistika gramatiko (2000), bazita pionire sur korpuso, distingas leksikajn, funkciajn kaj gramatikajn elementojn (*items*), krome leksikajn, funkciajn kaj gramatikajn morfemojn, sed ne estas klare, kiaj morfemoj estas la unua triopo. Al la leksikaj elementoj li kalkulas la tradiciajn radikojn kiel *labor-*, *rapid-*, *manĝ-* kaj asignas al ili gramatikajn vortospecojn kiel substantivo, adjektivo kaj verbo. Al la leksikaj morfemoj li kalkulas la tradiciajn afiksojn kiel *in-*, *et-*, *ad-* kaj asignas al ili gramatikajn vortospecojn kiel substantivo, adjektivo kaj verbo. Tio rememorigas la dividon de AdE. La uzo de funkciaj kaj gramatikaj morfemoj ne estas feliĉa, ja ankaŭ la gramatika funkcio estas funkcio, do ili estas same “funkciaj”.

2.5 Moderna defendo de la radikkaraktero

Schubert (1993, 2015) distingas prefiksojn (*bo*) kaj prefiksoidojn (*ek*, *mis*), radikojn (*kur*, *bel*, *pord*), sufiksojn (*eg*) kaj sufiksoidojn (*aĵ*, *ul*), finaĵojn (*o*, *a*) kaj fleksiojn (*j*, *n*). Kie estas la memstaraj radikoj?

Schubert (2015) parolante pri vortfarado deklaras tri gravajn ecojn de Esperanto: (1) kombinebleco, (2) semantikaj morfemoj kaj (3) morfemefiko. Pri la kombinebleco estos montrataj kelkaj ekzemploj de enleksikiĝoj kiuj alportas aldonajn signiferojn (5.2). Li akceptas kaj klarigas la morfemsistemon de René de Saussure, nome ke la vortoj estas verboj, substantivoj kaj adjektivoj, kiun la radiko enterenis. Tiel en *kuri*, *bela*, *somero* la vortiga finaĵo estas redunda (kiel laŭ la teorio de gramatika karaktero). La semantikaj morfemoj fine gvidas al gramatika distingo (ago → verbo). Li akceptas ankaŭ la teorion de Kalocsay pri vortefiko kiu tamen estas diskutbla (vd. 5.3).

3 Semantika aliro al la klasifiko de esperantaj morfemoj

3.1 Semantika aliro al radikoj ekde Duc Goninaz

La teorio pri gramatika karaktero de radikoj nur parte kaj ŝajne solvas la ĝeneralan problemon kial diversaj radikoj kondutas malsame en vortfarado. Duc Goninaz (2009) klarigas la problemon pli vaste, ja ĝi aperas ne nur kaze de diversaj vortospecoj, sed ankaŭ ene de la sama: *biologo*, *ekonomo*, sed *fizikisto*, *lingvisto*. Do, ne temas pri malsamaj “gramatikaj karakteroj de la

radikoj”, ja ĉiuj estus “substantivoj”, sed pri malsamaj sematikaj enhavoj de la radikoj, ĉi-kaze *biologo* kaj *ekonomo* entenas la signifon “profesio”, sed *fiziko* kaj *lingvo* ne, do necesas tion aldoni per la sufikso *-ist*.

Entute samaj nocioj povas vortiĝi en diversaj lingvoj en malsamaj vortospecoj kaj strukturoj (Koutny 2013), ekz. En: *be hungry* kaj De: *hungrig sein* ‘esti malsata’; Fr: *avoir faim* ‘havi malsaton’ aŭ Zh: 饿了 (*èle*) ‘malsati’, do la kategoriigo de radikoj, iliaj signiferoj ne estas universalaj. La konceptigo de “malsat” estas malsama en diversaj lingvoj. Esperanto sekvas plej ofte la modelon de ĝermanaj kaj slavaj lingvoj (cetere ankaŭ tiun de la hungara en tiu ĉi kazo), t.e. “malsat” estas eco de la parolanto: *li estas malsata*, sed eblas uzi ankaŭ la aliajn formojn kiuj prezentas aliajn konceptigojn: la franca esprimas posedon kaj la ĉina ŝanĝon de stato.

Se ni aplikas la principon de Szerdahelyi, nome ke la vortoj estis transprenitaj el la fontolingvoj kaj radikoj poste estis ekstraktitaj, tiam kompreneblas la malsameco de radikoj kiu siavice influas la vortfaradon. Tiel *broso* en la germana, franca, pola, rusa estas baze substantivoj el kiuj estas formitaj la verboj. Tion ni vidas ankaŭ en Esperanto. Se ni serĉas la originon de *kombi* kaj *kombilo*, ni ne trovas substantivajn bazajn vortojn en la pola kaj rusa, ankaŭ en la kazo de *hoko* kaj *hakilo* (Pl *czesać* por *kombi* kaj *grzebień* por *kombilo*, sed *szczotka* ‘broso’ estas baza vorto el kiu devenas *szczotkować* ‘brosi’). Por *broso*- kaj *hoko*- la baza vorto en la pola estas substantivo, sed por *komb*- kaj *hak*- verbo, do necesas aldoni la signifon ilo per la sufikso *-il* (Koutny 2025). Tio subtenas ankaŭ tiun observon de Szerdahelyi ke la signifo de la vortoj transprenitaj el la latinidaj kaj ĝermanaj lingvoj montras *slavan influon*. Neniu povas eskapi de certa influo de sia gepatra lingvo.

3.2 Provo klasifiki la esperantajn morfemojn laŭ semantiko: Jansen

Malgraŭ la kritikoj, la gramatika karaktero de radikoj daŭre estas akceptata far la Akademio kaj kelkaj aliaj. La problemo restas aktuala – tion montras ke en 2022 aperis la libro de Ryszard Rokicki: *Enkonduko en la morfologion de Esperanto* kaj en 2024 la libro de Wim Jansen: *Vortfarado en Esperanto*. La unua proponas distingi la radikojn laŭ tio, ĉu ili gvidas al malsamaj vortospecoj (ekz. havi stamp¹ por *stampi* kaj stamp² por *stampo*). Kio estas la diferenco inter la du radikoj? Ĉu tio ke la unua iel entenas la verbecon kaj la alia la substantivecon? Tio tamen envolvus la gramatikan karakteron de radikoj malgraŭ la intenco de la aŭtoro. Ekzistas nur unu *stamp*, sed la vortiĝo povas okazi en diversaj formoj laŭ la kunteksto, situacio.

Jansen jam provas realigi semantikan klasifikon de radikoj laŭ la kadroj de la skolo Funkcia Diskurs-Gramatiko (FDG). Koncerne la radikojn li distingas Entojn: ekzistaĵoj (EKZ) kiel *hom*, *kat*, *tabl*, okazaĵoj (OKZ) kiel *pluv*, *spektakl* kaj abstraktaĵoj (ABS) kiel *koncept*. Por plua divido de Entoj li baziĝas sur la demandovortoj por eblaj kategorioj: loko (LOK) kiel *lok*, *strat* kaj vortoj kun la sufikso *ej*; tempo (TMP) kiel *moment*, maniero (MAN) kiel *manier*, *procez*. Plue instrumento (INS) kiun pravigas ankaŭ per la ekzisto de *il*. La numeralojn li metas sub la klason kvanto (KVN). Li mencias ankaŭ motivon (MOT) pro la ekzisto de la demandovorto Kial.

La semantikaj kategorioj de FDG aplikata far Jansen rememorigas la konceptan semantikon (reprezentatan de ekz. Jackendoff 2007). Estus pripensinde fari klasojn surbaze de la afiksoj aŭ afikse uzataj elementoj, ĉar ili pli vaste priskribus kiuj sisigniferoj estas oftaj (vd. en 4.2).

La kvalifikon (KVL) kiel *bel*, *vast*, *proksim* li konsideras kiel dependan kategorion. Iom strange ankaŭ la elementojn kiuj vortiĝas primare kiel verboj, Jansen metas en la dependan kategorion, laŭ liaj vortoj situigaj radikoj (SIT) kiel *kur*. La dependecon montras nur la sintaksa rolo. La kvalifikoj kiuj kutime plenumas la rolon de epiteto estas tiaj, sed la verboj el la situigaj radikoj havas centran rolon. La ideo de agado estus pli grava, la verbo en frazo estas la centro de la evento kaj altiras aliajn elementojn – tiel aliras la dependogramatiko.

Ĉiuj radikoj povas vortiĝi en ĉiuj 4 vortospecoj (o, a, e, i) – kiel ankaŭ li prezentas tion.

4 Ebla praktika aliro

4.1 Klasifiko de morfemoj

Radikoj ĉiam havas semantikan enhavon, la afiksoj – laŭ Szerdahelyi – miksan/duonsemantikan. La partikuloj (*ĉu*, *ĉi*, *ju*, *des* ktp.), subjunkcioj kaj konjunkcioj (*ke*, *kaj*, *aŭ*) kaj la artikolo kiuj estas memstaraj radikoj, tamen ne estas semantikaj, ili plenumas sintaksan rolon konkretigi (artikolo) aŭ ligi (konjunkcioj kaj subjunkcioj). Mi metus ilin en apartan kategorion, provizore **funkcivortoj**.

La **memstariĝo de afiksoj** komence estis malofta, sed pli kaj pli ofta fenomeno. Tion analizis jam Gledhill (2000) surbaze de sia propra korpuso kaj konstatis la oftan memstaran uzon (ekz. *-an* kaj *-ej*), Planchon (2025) donas pli vastan analizon surbaze de la Tekstaro. Do, eblas paroli pri la *anoj* de la grupo kiuj *ege* ŝatas la *ejojn* de la domo, do ili funkcias kiel radikoj kaj realiĝas kiel substantivoj, verboj, adjektivoj aŭ adverboj. Pro tio tiuj memstariĝintaj afiksoj estas nomataj ofte *afiksoidoj*. Tio pravas ke tiuj

ĉi afiksoj estas plene semantikaj. Ankaŭ la prepozicioj (memstaraj radikoj) plenumas la rolon de prefiksoj (*eniras, preterpaŝas* ktp.), do estas ankaŭ funkciaj elementoj.

Leviĝas la demando, ĉu tiuj ĉi memstariĝintaj afiksoj estas jam radikoj, kiuj plenumas ankaŭ la rolon de afiksoj aŭ ni konservu ilian apartecon kiel afikso. Se konsideri ilin radikoj, tio gvidus al tio ke necesus paroli pri vortkunmeto kaj ne derivado kaze de ilia uzo en vortfarado. Tamen ne ĉiuj afiksoj memstariĝis: en la nomo de landoj *-i* (*Francio, Hungario* ktp), *-ist*, la participaj sufiksoj *-int, -ant, -ont, -it, -at, -ot*, ankaŭ la neoficialaj *-iz* (ekz. *najlizi meblon*), *-iv* (ekz. *produktiva*), *-oz* (*fruktoza*) kaj pluraj afiksoj uzataj en sciencaj terenoj (*-it* en *hepatito*, *-ik* en *morfemiko, komputiko*). Ĉiukaze, ili estas semantikaj elementoj kun funkcio en la vortfarado. Gledhill (2000) rimarkas ke la afiksoj ligiĝas senpere al la radikoj, sed kaze de aliaj radikoj, la unua povas konservi sian vortigan finaĵon (dorm(o)ĉambro – vd. ankaŭ Dols Salas 2015 pri tiu libereco). Pro tio kaj la pedagogia valoro indas konservi ilian apartan statuson kiel afiksoj.

La tradiciajn afiksojn eblus ordigi en 3 kategoriojn laŭ ilia konduto:

- **radikecaj afiksoj**¹: *-an, -ej, -il, -in ... pra-, ek-* ja ili same kondutas kiel radikoj: *manĝejo* analiziĝas same kiel *manĝoĉambro*, do ĝi estas ejo kie oni manĝas (analogie al ĉambro kie oni manĝas). *Malnova/praa urbo*. Ili povas vortiĝi kiel *ano, ejo, ilo, ino ... praa, eki*. Same kiel *membro, ĉambro, instrumento, virino ... malnova, komenci*. Kiel plena radikoj, en la dua loko de la kunmetita vorto, ili plenumas la ĉefan rolon.
- **radikecaj afiksoj**²: *-et, -eg* uzeblas memstare (*eta, ega*), sed ne kondutas en la vortoj kiel dua radikoj: *tableto* kaj *tablego* ne estas etoj aŭ egoj, sed tabloj. Kutime ili ne ŝanĝas la vortospecon (*ridi* kaj *rideti* same estas verboj, *tabloj* kaj *tablegoj* same estas substantivoj, *varma* kaj *varmega* same adjektivoj).
- **veraj afiksoj**: tiuj elementoj kiuj kutime ne memstariĝas, servas nur la derivadon: *-it, -at, -ot, -it²* (en malsanoj), *-iv, -ik, -oz...* *pseŭdo-*.

Finaĵoj estas aparta funkcia klaso kiu dividiĝas al vortigaj kaj vortkategoriaj finaĵoj. Aperas problemoj kun la verbaj finaĵoj *-is, -as, -os, -us, -u* kiuj plenumas samtempe la vortigan kaj kategorian rolon.

En la klasifiko de esperantaj morfemoj mi nur iomete modifas la skemon de Szerdahelyi, konsiderante ilian signifon kaj funkcion en la nuntempa stato:




Bild 3: Morfemklasifiko laŭ la aŭtoro

4.2 Semantika analizo de morfemoj

La **semantika divido de radikoj** de Jansen (2024, vd. en 3.2) estas nova progreso. Mi akceptas ilin kaj proponas aldoni aliajn kategoriojn kiujn ni akiras, se ni esploras kiujn kategoriojn realigas la sufiksoj, ekz. la tenujon (TEN) kiel *botel*, *sak*, por aliaj radikoj necesas aldoni *uj*: *monujo*, *dosierujo*. La uzo de *uj* en la landnomoj (*Francujo*) kaj arbonomoj (*pomujo*) estas enleksiĝintaj elementoj, ja havas plusan signifon.

Eblas mencii ankaŭ la diferencon en la transitiveco de verboj (Koutny 2025) kiu estas karakterizo de iuj verboj, aliaj bezonas la sufikson *-ig* por fariĝi tia: *montri* estas transitiva, sed *aperi* bezonas jam sufikson por transitiveco por alveni al la transitiva verbo *aperigi* (kun simila signifo kun *montri*). Same, kaze de la netransitiveco iuj verboj baze estas netransitivaj, aliaj bezonas la sufikson *-iĝ* por fariĝi tia: *evolui*, sed *disvolviĝi*, nur *montri* iujn verbojn kun simila signifo. Necesas tion lerni kiel la genron kaze de genrohavaj lingvoj (kiel la germana, franca kaj pola). Cetere, tiu distingo ne aperas en ĉiuj lingvoj, ekz. ne en la angla (*he changes the form* kaj *the form changes*). Tio gvidas al multaj eraraj uzoj en Esperanto. Iuj reagus ke tio ne estas semantika distingo, sed gramatika, tamen ĝi enestas ankaŭ en la koncepto, ĉu ĝi prefere aperos kun iu aldonata elemento. *Dir* supozigas ion aldonan (ekz. *diri vorton*) kaj *parol* iun manieron (*paroli rapide/france*), sed tio jam gvidos nin al la sintakso.

Estus interese detale esplori la afiksojn elektitajn far Zamenhof, kiun signifon ili eksplacitigas, kiomgrade ili estas ĝeneralaj en la fontolingvoj kaj kiujn semantikajn efikojn ili havas, sed ĉi-tie nur ekzemploj estas analizataj.

La **participaj sufiksoj** montras kompletan sistemon laŭ tenso kaj voĉo en Esperanto, sed en aliaj lingvoj nur iuj elementoj de la sistemo ekzistas (la enkrampaj elementoj aŭ maloftas aŭ ne precize participoj estas). La ĉina tute ne havas participojn.

Voĉo/tenso	Pasinteco	Nuntempo	Futuro
aktiva	leginta	leganta	legonta
Fr	ayant lu	(lisant)	-
En	having read	reading	-
Pl	(przeczytawszy)	czytający	-
Hu	(elolvasva)	olvasó	-
Pasiva	legita	legata	legota
Fr	lu	-	(à lire)
En	read	-	-
Pl	przeczytany	czytana	-
Hu	elolvasott	olvasott	olvasandó

La **sufiksoj** *-ant*, *-ist*, *-an*, *-ul* taŭgas por la formado de homo (aldonas signifera de homo) kiu (1) okupiĝas pri la agenhavo de la radiko, se ĝi aplikeblas al homo (2) profesie aŭ krede aliĝas al la enhavo de la radiko, (3) estas membro de la radika enhavo, (4) havas la kvaliton entenitan en la radiko:

1. El verbo (aŭ radiko kiu esprimas agon) konstrui > konstruanto, legi > leganto
2. El verbo (aŭ radiko kiu esprimas agon) aŭ el substantivo (radiko kiu esprimas objekton) konstrui > konstruisto, instrui > instruisto; meblo > meblisto, lingvisto, artisto, sed komunisto, ateisto, globalisto konsideriĝas bazaj vortoj
3. El substantivo (pli precize radiko kiu esprimas lokon) klubo > klubano Franciano, universitatano, lokano, urbano
4. El adjektivo (aŭ radiko kiu esprimas kvaliton) aŭ el substantivo (kiu karakterizas la ulon) saĝa > saĝulo, alta > altulo, intelekto > intelektulo, bieno > bienulo, ventrego > ventregulo

-ant/int/ont kaj *-at/it/ot* ligiĝas nur al radiko kiu esprimas agadon kaj per *o*-finaĵo gvidas al homo se la radiko tion permesas: *amanto* kaj *amato*. Se la radiko ne permesas tion, tiam ĝi rezultas en substantivo kiu plenumas la agadon, ekz. *sekcanto* en matematiko, aliaj formoj povas ne havi sencon kiel *manĝato*, *legito*. La jam menciita problemo de profesioj solveblas per la signifero profesio (PRF) kiu enestas en *aktoro* kaj *inĝeniero*, sed necesas *ist* por *lingvisto*, *politikisto*, *kuiristo*. La virineco (IN) estas signifero de *amazon* kaj *madon*, sed por aliaj semantike eblaj vortoj necesas aldoni *in* (*aktorino*, *instruistino*).

Delonge daŭras la diskuto (vd. ankaŭ PMEG), ĉu la bazaj radikoj kiel *student*, *aktor* kaj la radikaloj *politikist*, *leganto*, *junul* estas viraj aŭ neŭtralaj. La lingvouzo evoluas en la direkto de neŭtraleco. La bazaj radikoj kaj ankaŭ la menciitaj radikecaj sufiksoj entenas nur la signifera de homo. Naskiĝis

la bezono de sufikso kiu esprimas la virecon se tio necesas, same kiel *in* esprimas la virinecon. Por tio la sufikso *iĉ* estas proponita kaj limigite jam uzata: aktoro > *aktorino* kaj *aktoriĉo*.

-*ej* esprimas lokon kie la agado en la radiko realiĝas aŭ la estaĵo esprimata per la radiko estas. Ĝi havas sian fonton en la slavaj lingvoj, en la pola tio okazas sufiĉe regule, en aliaj lingvoj ekzistas diversaj solvoj: krom la sufiksoj (kursive) aldonon de ‘salono’, ‘vendejo’ (en la ĉina nur kunmeto):

Eo/Pola	Angla	Germana	Franca	Rusa	Hungara	Ĉina
mangejo <i>jadalnia</i>	dining room / canteen	Speisesaal / Kantine	salle à manger / cantine	столовая	étkező / menza	餐厅 / 食堂
atendejo <i>poczekalnia</i>	waiting room	Wartezimmer	salle d’attente	зал ожидания	váróterem	等候室 / 候车室
nagejo <i>plywalnia</i>	swimming pool	Schwimmbad / Schwimmhalle	piscine	бассейн	uszoda	游泳池
lavejo <i>pralnia</i>	laundry / laundromat	Wäscherei / Waschsalon	laverie / blanchisserie	прачечная	mosoda	洗衣房 / 洗衣店
bakejo <i>piekarnia</i>	bakery	Bäckerei	boulangerie	пекарня	pékség	面包店 / 面包房
florvendejo <i>kwiaciarnia</i>	flower shop / florist’s	Blumenladen	fleuriste / magasin de fleurs	цветочный магазин	virágbolt	花店
librovendejo <i>księgarnia</i>	bookstore / bookshop	Buchhandlung / Buchladen	librairie	книжный магазин	könyvesbolt	书店
sukeraĵejo <i>cukiernia</i>	pastry shop / confectionery	Konditorei	pâtisserie / confiserie	кондитерская	cukrászda	糕点店 / 甜品店

Nia celo estas unuavice kompreni esperantan vortfaradon. Jen la nuna listo de semantikaj grupoj surbaze de Jansen kun miaj modifoj kaj kompletigoj konsiderante la afiksojn. Jansen distingas 3 kategoriojn ene de ĉiuj sendependaj radikoj, nomatajn Entoj (ENT): (1) Ekzistaĵo (EKZ): persono, besto, objekto; Okazaĵo (OKZ): evento, procezo; (3) Abstraktaĵo (ABS): ekz. *koncept*. Aldone li prezentas kategoriojn motivitajn per la demandovortoj. En

la sistemo proponita far mi, mi konsideras la sufiksojn por difini kategoriojn, ja ili rolas en la vortfarado. Jen kelkaj (kategorioj far mi enkondukitaj estas dikigitaj).

Ene de EKZ indas distingi la kategoriojn (kiuj aplikeblas al homoj kaj bestoj):

Homo (**HOM**), ekz. person, najbar, kuracist, lernant, kluban, saĝul

Viro (**VIR**), ekz. patr, taŭr kaj aktoriĉ

Virino (**IN**), ekz. dam, patrin.

Profesio (**PRF**): aktor, inĝenier, kuracist

Objekto (**OBJ**): libr, pan, legaĵ, manĝaĵ

Abstraktaĵo (**ABS**): intelekto, beleco, grandeco

Loko (**LOK**): domo, strato, bakejo

Ujo (**UJ**): skatolo, botelo, ovuo, kandelino

Tempo (**TMP**): lundo, monato, jaro

Instrumento (**INS**): martelo, broso, kombilo, veturilo

Kvanto (**KVN**): du, mil, duope, duone, multoble, sablero

Jansen konsideras du dependajn kategoriojn, la Kvalifikaĵojn kaj la Situigajn radikojn. La unua plenumas post vortigo en frazoj kutime la rolon de epiteto, do dependa kategorio en sintaksa kadro. La dua vortigas kiel verbo kiu ne estas dependa kategorio, inverse de ĝi dependas la frazstrukturo. Por tio mi uzos Ago (**AGO**) kaj Okazaĵo (**OKZ**).

Kvalifikaĵo (**KVL**): bone, bele, proksime, homeco, najbareco

Ago (**AGO**): manĝo, lego, laboro, pluvo

Transitiveco (**TR**): direkto, montri, aperigi, evoluigi

Okazaĵo (**OKZ**): pluvo, spektaklo.

5 Vortfarado

Derivado (uzo de afiksoj) kaj vortkunmeto (kunigo de bazaj vortoj por formi novan, kunmetitan vorton) servas kutime la vortfaradon, sed ekzistas ankaŭ aliaj formoj kiel la mallongigo (*prof.* el profesoro, *sal'* el saluton, *foto* el fotografio) kaj kreo de mozaikvortoj (*UEA* el Universala Esperanto-Asocio). En Esperanto necesas enkonduki ankaŭ la simplan vortigon. La vortiga finaĵo fermas ĉiam ankaŭ derivitan/kunmetitan vorton.

5.1 Vortigo

Per la aldono de la vortigaj finaĵoj (-o, -a, -i, -e) jam funkcias la vortfarado. Tiu operacio ne aperas en aliaj lingvoj, ja tie la bazaj elementoj estas vortoj. Jam menciite, ke la verbaj kategoriataj finaĵoj (*as, is, os, us, u*) plenumas ankaŭ la rolon de vortigo.

La **senpera vortigo** (1) per la finaĵo *i* kreas verbon el koncepto pri agado aŭ okazaĵo en la radiko (AGO kaj OKZ): *legi, konstrui, manĝi, pluvi* ktp. (2) Kaze de koncepto pri objekto, homo, abstraktaĵo la rezulto estas substantivo per la aldono de *o*: *tablo, homo, animo* ktp. (3) Kaze de koncepto pri kvalito aŭ kvalifiko per aldono de *a* rezultas adjektivo: *bela, granda, proksima* ktp. Temas pri primaraj vortoj. La tria grupo same nature realiĝas kiel adverbo per *e*: *bele, grande, proksime* ktp.

Eblas aldoni al la radikoj ankaŭ aliajn finaĵojn pro la fleksebla karaktero de Esperanto, la radikoj povas vortiĝi en diversaj vortospecoj, se tio havas sencon. El la unua grupo (ago-koncepto) iĝas abstraktaj substantivoj per la aldono de *o*: *lego, konstruo, manĝo* kiuj entenas kaj la agadon kaj la rezulton: *la manĝon oni planis por tagmezo; la manĝo bongustis*. Pli ofte tiuj frazoj plikonkretiĝas per la uzo de *ad* kaj *aĵ*: *la manĝadon oni planis por tagmezo; la manĝaĵo bongustis*. Per la aldono de *a* iĝas adjektivo kiu rilatigas ion al la baza koncepto: *lega* (kapablo), *konstrua* (metodo), *manĝa* (kutimo).

La konceptoj pri objekto, homo, abstraktaĵo (EKZ) povas vortiĝi ankaŭ kiel verboj: *patri, prezidenti* kiuj esprimas la samon kiel *esti patro/prezidento*. Tamen kelkfoje aldoniĝas specialaj signiferoj pro la konciza uzo: *animi*: aldoni animon (vivon), *asfalti*: provizi per asfalto, *loki*: meti en lokon, *trui*: fari truon. Ĉi tie mankas reguleco, la praktika uzo kiu preferas pli mallongajn vortojn, per la senpera verbigo esprimas la plejofte, verŝajnan signifon. Temas pri **enleksikiĝo**. La adjektivigo okazas regule: *patra* (amo), *anima* (stato), *loka* (kutimo).

Ankaŭ kvalitoj (KVL) povas realiĝi en verbaj formoj: *belas, verdas, proksimas* ktp. kun la signifo: *bela/verda/proksima*. Iuj atribuas pli dinamikan signifon al tiuj verboj ol al la strukturo estas + adj. Per la aldono de la finaĵo *o* ekestas abstrakta substantivo: *belo, verdo, proksimo*, ekz. *la printempa verdo allogas min*. Pli ofte tiu frazo konkretiĝas per la uzo de *ec* kaj *aĵ*: *la printempa verdec/verdaĵo allogas min*.

5.2 Derivado

Se ni akceptas ke certaj tradiciaj afiksoj estas jam radikoj, tiam ilia uzo povus aperi sub la kunmetado. Pro praktikaj, funkciaj kaj pedagogiaj kialoj indas ilin lasi sub derivado, ja ili havas gravan rolon en la formado de novaj vortoj. Por la vera derivado restos la radikecaj afiksoj²: *-et, -eg* kiuj ne ŝanĝas la vortospecon de la vorto (kulero > kulerego, manĝi > manĝeti) kaj la veraj afiksoj kiuj servas nur la vortfaradon (*butonizi, pagiva, montoza, sufiksoido*), inkluzive *ĉj* kaj *nj* kiuj eĉ ŝanĝas la finon de la baza vorto (*Joĉjo* el *Johano*, *panjo* el *patrino*), tiel malobeas al la aglutina sistemo.

La signifo de derivitaj vortoj ĝenerale estas konkludebla el la elementoj kunigitaj – tio nomiĝas **kombinebleco/komponebleco** (En: compositionality) kaj estas bonvena trajto ĉe planlingvo. Tio helpas ankaŭ la komputilan prilaboron (Schubert 1993). Do, *muzikilo* estas ilo/instrumento por muziko, *ovujo* estas ujo por ovoj, *kantisto* estas profesiulo pri kantado, *maldikulo* estas maldika homo, ktp.

Tamen, *lernejo* (ejo por lerni) manifestas ankaŭ alian signifon, jam enleksikiĝintan, nome ke temas pri institucio kie oni lernas. Same ĉe *malsanulejo*, *banejo*, *dormejo*. En la hejmoj kutime uzatas *lernoĉambro*, *banĉambro* kaj *dormoĉambro*. Ankaŭ la Zamenhofa *herbejo* havas enleksikiĝintan signifon, ja ne temas pri ejo. La aldona signifero, specifa por la donita vorto eskapas de la reguleco ankaŭ kaze de *ar*, *er*: kp *vagonaro*, *estraro*, *registaro*, *vortaro*; *sablero*, *akvero*, ili gvidas al novaj unuoj. Tio montras enleksikiĝon kiu estas normala fenomeno ĉe vivaj etnaj lingvoj. Se ne enleksikiĝas iu elemento, ĝia konkreta signifo ŝvebas (vd. la eksperimenton per *libraro* en Koutny 2015: ĝi povas esti biblioteko aŭ librovendejo krom la simpla kolekto da libroj).

Por savi la originan signifon de la deriviloj, ni povus diri ke krom la ĝenerala signifo, kelkfoje la derivitaj vortoj akiris **specialan signifon**, enleksikiĝintan (*malsanulejo*, *tranĉilo*, *vagonaro*). Do, ĉe la analizo de derivitaj vortoj plej ofte la principo de kombinebleco manifestiĝas, sed en kelkaj kazoj okazas aldono de signifero, enleksikiĝinta en la parolkomunumo. Ni vidas la batalon de reguleco kaj viveco. Pri la influo de la uzo de Esperanto jam Ferdinand de Saussure (1916/2022) atentigis.

La principo de kombinebleco helpas facile kompreni Esperanton. Leviĝas ankaŭ la demando pri la alia flanko: ĉu tio same aplikeblas ĉe la sintezo? Se iu ĉino aŭ japano ne konus la vorton *malsanulejo* kiu praktike enleksikiĝis, kaj provus krei vorton por tiu nocio, verŝajne alvenus al la pli simpla kaj pozitiva (!) *kuracejo* aŭ *sanigejo* (pri tiu temo vd. Koutny 2018). Ankaŭ ĉi-tie kapteblas la influo de eŭropaj lingvoj (De: Krankenhaus, Ru: больница; eĉ la hungara kórház). Laŭ lingvopsikologio, oftajn vortojn ni storas en nia mensa leksikono kiel unuojn kaj ne konstante analizas kaj sintezas ilin dum uzo.

Specialaĵo de Esperanto estas ke la semantike rilataj elementoj de iu evento ankaŭ morfologie interrilatas, ja ili ofte deriveblas el la sama radiko, ekz. el *vend* devenas *vendi*, *vendisto*, *vendejo* kaj eblus uzi ankaŭ *vendaĵon* (Koutny 2014, 2015). Tiu produktiva vortfarado kontribuas al la facila lernebleco de Esperanto.

5.3 Kunmetado kaj klasifiko

Se du aŭ plurajn vortojn oni kunmetas, ekestas kunmetita vorto. Ofte la ĉefa elemento (kapo) estas la lasta kaj la alia dependa elemento (modifanto). Ĉe la kunmeto povas aldoniĝi ligelemento inter la du vortoj (kiel en la germana *Geschäftsführer*) aŭ malapero de la lasta elemento (*dormĉambro*, *vortfarado*). En Esperanto ekzistas certa libereco koncerne la konservon de la lasta litero de la unua vorto, ja same bone povas funkcii *dormoĉambro*, *vortofarado*. La kunmeto estas konciza, kutime ne konservas la originan rilaton inter la vortoj, ankaŭ en Esperanto tio same okazas. Krome, povas aldoniĝi aliaj signiferoj. Tiam temas pri enleksikiĝo, t.e. la signifo fiksiĝas dum la uzo.

Konsiderante la originan rilaton inter la vortoj tiel klasifikeblas la **kunmetitaj vortoj kun suborda rilato**:

Subjekta kunmeto: sunbrilo ← la suno brilas

Same: neĝfalo, akvofalo, korbato, fulmotrafita

Objekta kunmeto: fiŝkapti, fiŝkapto ← kaptas fiŝon

Same: veterprognozo, librelegado, nenifaranto, birdotimigilo, voĉdoni

Predikativa kunmeto: ruĝpentri ← pentri ruĝa

Same: bontrovi

Adjekta kunmeto: bonfarti ← farti bone, retkapti ← kapti per reto mortpreta ← preta por morti

Same: finvenki, bonveni, piedmarŝi, satmanĝi, tramveturi, aventurriĉa (riĉa je aventuroj),

Epiteta kunmeto: dikfingro ← dika fingro (+ speciala signifo), ĉefurbo ← ĉefa urbo literaturhistorio ← historio de literaturo, lernoĉambro/lernejo ← ĉambro/ejo por lerni, vangofrapo ← frapo sur la vango, bluokula ← (blua okulo) + a, miaflanke

Same: tabloteniso (teniso sur tablo), skribmaŝino (maŝino por skribi), librebroto, suptelero, manskribo, eksprestrajno, ĉefministro, subĉapitro, ruĝalgoj, flavalgoj, verdbakterioj, dupieda, helblua, facilanima, mikrostrukturo, birdokanto, piedpilko, duoninsulo, trietaĝa, laŭtvoĉe.

Tiujn kunmetojn Kalocsay rifuzas kiel ne eblajn aŭ esceptajn (dikfingro), kaj enkondukas iun strangan nocion pri vortefiko en PAG (1980) (laŭ li en *belkulto* la ĉefa elemento de la kunmeto *kulto*, substantivo, substantivigas la flankan elementon, do *kulto de belo*). Tiun problemon kaŭzas la supozo de gramatika karaktero de radikoj.

En lingvoj kie kunmetado estas kutima, la epiteta kunmeto estas normala afero (vd. De: *Schwarzmarkt* 'nigra merkato', *Weisswein* 'blanka vino', *Gelbfieber* 'flava febro', eĉ en la angla: *blackbird*). En la hungara (gepatra lingvo de Kalocsay! kaj mi) estas multaj ekzemploj por tio, ekz. kun *sárga* 'flava': *sárgarépa* 'karoto', *sárgabarack* 'aprikoto', *sárgarigó* 'oriolo' aŭ

gyorsvonat ‘rapidtrajno’. Kiam la epiteta esprimo kune havas novan signifon – ofte ankaŭ en terminoj – la epiteto skribiĝas kune kun sia kvalifikita vorto. Ankaŭ en Esperanto videble, estas multaj ekzemploj (*mezlernejo*, *ĉefministro*, *bonkora*, *helblua* ktp) – malgraŭ la malpermeso –, do la teorio estas senbaza.

Ekzistas ankaŭ **kunorditaj kunmetitaj vortoj** kiel *hungara-esperanta* (vortaro) aŭ *pli-malpli* (konvena) aŭ *membro-abonanto*, *sud-orienta* (parto), *surd-muta*.

5.4 Strukturo de esperantaj vortoj

La esperantaj vortoj strukturiĝas tiel (elemento en {...} povas ripetiĝi):

{prefikso} + {radiko} + {sufikso} + finaĵo/vortiga+kategoria_finaĵo

mal + **jun** + ul + in + o + j eks+mal+**grand**+ul+in+ar+o+n,
eks**bazlerne**janoj, **et**ulino

e + **ven** + ad + is, re+kun+**ven**+is, **elig**os, **reskrib**atas

Kie devas aperi almenaŭ unu radiko aŭ radikeca sufikso, prefiksoj kaj sufiksoj povas aperi eĉ pluraj, la finaĵo devas aperi (krom la memstaraj radikoj kiel *hodiaŭ*). Ŝajnas ke en la interpreto de vortoj la dekstraj afiksoj estas la unuaj. Eblas pluraj interpretoj: ĉu mal-venkema estas la sama kiel malvenk-ema?

La vortfarado kun prepozicio estas kalkulebla kiel derivado aŭ kunmeto: *eniri*, *eldoni*, *pripenso*, *kontraŭdiro*, *antaŭhieraŭ*, *postkongreso* ktp. Prepozicio povas esti kerno de kompleksa vorto: *antaŭulo*, *peri*, *aliĝi*.

6 Vortospecoj en Esperanto

La **vortospecojn** en Esperanto eblas difini laŭ la finaĵoj anstataŭ la tradicia semantika difino (ekz. verbo esprimas agadon), do, verboj finiĝas per -i, -is, -as, -os, -us, -u. Plej komplete difini kaj priskribi la vortospecojn eblas per

- (1) Forma difino (ekz. substantivo finiĝas per -o)
- (2) Kiujn kategoriojn povas havi (ekz. substantivo la pluralon kaj la akuzativan kazon)
- (3) Sintaksa karakterizo (ekz.: substantivo povas plenumi la rolon de subjekto, objekto, predikativo kaj kune kun prepozicio adjekton)
- (4) Komplementoj kiujn ĝi povas havi (ekz. substantivo povas havi epiteton, suplementon (adjektoforman epiteton), relativan subpropozicion.
- (5) Semantika difino (ekz. substantivo esprimas objekton, estaĵon, abstraktaĵon)

7 Esperanto laŭ la morfologia tipologio

Laŭ morfologiaj trajtoj kutime distingatas la sekvaj grupoj:

- aglutinaj (algluaj): por ĉiuj sememoj kaj funkcioj ekzistas aparta morfemo;
- fleksiaj (fandaj): kie la aldonita informo aperas en la ŝanĝita formo de la baza vorto kaj
- izolaj: kie la vortoj viciĝas unu apud la alia senŝanĝe.

Ofte ankaŭ la polisentezaj lingvoj aldoniĝas kiel aparta kategorio, ili estas ekstreme algluemaj (ekzemple la gronlanda). Lingvoj ordinare montras ĉefe la karakterizojn de iu kategorio, sed ili povas montri ankaŭ iujn ecojn de alia kategorio. Ekz. la angla konsideriĝas izola lingvo, sed aperas trajtoj de fandeco (ekz. Sg foot > Pl feet, Pres. give > Past gave) kaj alglueco (ekz. Sg table > Pl tables, Pres. move > Past moved).

La vortkonstruo de Esperanto estas tipa por la **aglutinaj** lingvoj, nome, al la radikoj povas ligiĝi afiksoj por krei aliajn semantike rilatajn vortojn kaj tio ĉiam eblas, se la nova elemento havas sencon. La morfemoj restas senŝanĝaj. Nur la *-ĉj* kaj *-nj* sufiksoj eskapas de la regulo, ja ili misformas la bazan vorton (Petro > *Peĉjo*, Maria > *Manjo*), do temas pri fandado. Pro la alglua vortfarado Esperanto estas konsiderata aglutina lingvo (ekz. Wells 1978). Ankaŭ la finaĵoj povas aldoniĝi kun sintaksaj funkcioj. Tamen en sintaksa nivelo, Esperanto ne eluzas la eblojn de aglutineco. Ni komparu la strukturojn de la hungara lingvo kaj Esperanto (kie la hungara uzas unu vorton, Esperanto uzas tri!):

Mi povas paroli	kun miaj amikoj.
Beszélhetek	barátaimmal.
Parol+pov+mi	amiko+miaj+kun

Nur la sintaksa funkcio de la rekta objekto esprimiĝas en ĝi per aldona morfemo (*-n*), sed la aliaj sintaksaj roloj per prepozicioj. Ni rigardu ankaŭ la verban paradigmon! En la vorto *parolos* troviĝas du morfemoj (parol- + -os), sed 4 funkcioj: semantika enhavo en la radiko parol- + verbeco+futura-tempo+indikativa_modo en la finaĵo -os. Tio jam estas **fanda** trajto. Ni devas konkludi, ke Esperanto estas ĉefe en la leksika-semantika nivelo alglua, kaj en la sintaksa nivelo parte fanda kaj izola.

Piron (1977) komparas Esperanton al la **izola** ĉina lingvo. Ankaŭ en la ĉina la bazaj elementoj estas senŝanĝaj kiel en Esperanto kaj ankaŭ ilia kombino por pli kompleksaj vortoj ne ŝanĝas ilin. Li mencias *malsanulejon* kiu konstruiĝas el mal- san- -ul -ej -o kaj komparas ĝin al la ĉina *yī-yuàn* (kurackorto). Estas simileco en la travideble kunmeta strukturo, sed estus pli

granda, se *kurac- ej -o* estus la kutima vorto por hospitalo en Esperanto. Temas pri la influo de Eŭropaj lingvoj kiel la germana (Krankenhaus ‘malsanul+domo’) kaj enleksikiĝo de la vorto *malsanulejo*.

Piron alvenas al la konkludo ke malgraŭ la Eŭropa deveno de Esperantaj radikoj ĝiaj strukturo kaj spirito pli proksimigas ĝin al aziaj lingvoj. Tamen estas diferenco, ĉar en la ĉina la elementoj kunmetiĝas kaj la finan signifon kaj rolon decidas la kunteksto, dume en Esperanto la vortoj estas ĉiam fermitaj per la vortiga finaĵo kiu decidas pri ilia vortospeco, ne la kunteksto. Tio donas al Esperanto facile travideblan strukturon. La aglutineco ne estas eluzata en la diversaj sintaksaj roloj, tie ĝi estas izola.

Sume, Esperanto estas aglutina lingvo, ĉefe se temas pri la leksika-vortfara nivelo, kaj fanda kaj izola se temas pri la sintaksa nivelo de morfemoj. Ankaŭ la memstariĝo de afiksoj montras en la direkto de izoleco.

8 Konkludoj

Komunikaĵo konstruiĝas el vortoj laŭ sintaksaj reguloj kaj vortoj konstruiĝas laŭ morfologiaj reguloj. La bazaj elementoj de Esperanto estas la finaĵbezonaĵaj radikoj kiuj bezonas finaĵojn por vortiĝi kaj plenumi sian rolon en komunikaĵo. La memstaraj elementoj, la afiksoj kaj finaĵoj estas listigeblaj, difinitaj dekomence, estas malfacile aldoni novajn (vd. la strebadon por la vira sufikso *-iĉ* kaj la neŭtrala pronomo *ri*), kvankam ĉe la sufiksoj tio okazas (ankaŭ por terminara bezono). En vivanta lingvo la lingvokomunumo produktas ŝanĝojn. Tiel la afiksoj komencis sian memstaran vivon kiel finaĵbezonaĵaj radikoj, krome iuj derivitaj vortoj akiris specifan signifon kaj enleksikiĝis. Necesis rekonsideri la esperantajn morfemojn laŭ la nuna stato surbaze de ilia leksika kaj gramatika/funkcia signifo – iam komencita de Szerdahelyi.

Por pli bone kompreni la vortfaradon necesis ankaŭ revizio de la koncernaj ĝisnunaj aliroj, definitive rifuzi la gramatikan karakteron de la radikoj kaj la vortefikojn – ankoraŭ subtenataj de AdE kaj provi apliki semantikan kategoriigon komencitan de Jansen. La afiksoj – intuicie elektitaj de Zamenhof – multe malkaŝas el la profundaj semantikaj kategorioj, ili devas esti esplorataj plu.

La vortospecoj en Esperanto difineblas surbaze de formaj kriterioj. Tio donas unusencecon kaj grandan travideblecon al esperantaj tekstoj. Se prijuĝi Esperanton laŭ morfologia tipologio, distingeblas la vortfaraj reguloj, laŭ kiuj Esperanto estas ĉefe aglutina lingvo, kun fleksiaj kaj izolaj trajtoj. Laŭ la sintaksa flanko de morfologio jam tio ne direblas, tie ĝi estas izola kaj analiza.

Bibliografio

- Aktoj de la Akademio 1963–1967*. 1968. Rotterdam: Akademio de Esperanto.
- Blanke, Detlev. 2001. "Vom Entwurf zur Sprache." En *Planned Languages: From Concept to Reality*, redaktis Klaus Schubert, 37–89. Brussel: Hogeschool voor Wetenschap en Kunst. <http://d-nb.info/1239423241/34>
- Dols Salas, Nicolau. 2015. "Diversity, competence and standardisation in Esperanto: hints and questions." *JKI (Język. Komunikacja. Informacja)* 10: 63–84. https://wydawnictworys.com/media/products/ad5b2e0fa12b6169bcd7b95040b1a6f2/attachments/pl_PL/spis-tresci.pdf
- Duc Goninaz, Michel. 2009. "Szerdahelyi kaj la 'gramatika karaktero de la radikoj'." En *Abunda Fonto*, redaktis Ilona Koutny, 166–177. Poznań: ProDruk.
- Gledhill, Christopher. 1998. *The Grammar of Esperanto. A Corpus-based Description* (Languages of the World/ Materials 190). Nova eld. 2000. München kaj Newcastle: Lincom Europa.
- Jackendoff, Ray. 2007. *Language, Consciousness, Culture. Essays on Mental Structure*. Cambridge, MA: MIT Press.
- Jansen, Wim. 2024. *Vortfarado en Esperanto*. Rotterdam: Eldonejo Bero.
- Kalocsay Kálmán kaj Gaston Waringhien. 1980. *Plena Analiza Gramatiko de Esperanto*. 4-a eld. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio. [= PAG].
- Koutny Ilona. 2013. "Kiel niaj pensoj vortiĝas." En *Leksikologio, frazeologio, historio, semantiko kaj terminologio: du kontinentoj renkontiĝas en Hanojo. Aktoj de la 35-a Esperantologia Konferenco*, redaktis Christer Kiselman kaj Mélanie Maradan, 35–48. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Koutny, Ilona. 2014. "Kompozicionalitás és lexikalizálódás egy tervezett nyelv esetében" (Kombinebleco kaj enleksikiĝo kaze de planita lingvo). En *Nyelvben a világ. Tanulmányok Ladányi Mária tiszteletére* (Mondo en la lingvo. Studoj omaĝe al Mária Ladányi.), 144–151. Budapest: Tinta Kiadó.
- Koutny, Ilona. 2015. "A typological description of Esperanto as a natural language." *JKI (Język. Komunikacja. Informacja)* 10: 43–62. https://wydawnictworys.com/media/products/ad5b2e0fa12b6169bcd7b95040b1a6f2/attachments/pl_PL/spis-tresci.pdf
- Koutny, Ilona. 2018. "Tipologia karakterizo de esperanto kiel natura lingvo." En *Aliroj al Esperanto*, redaktis Christer Kiselman, Renato Corsetti kaj Probal Dasgupta, 129–146. Dobřichovice: Kava-Pech. http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/IlonaK_Tipologia2015.pdf
- Koutny, Ilona. 2025. "La rolo de István Szerdahelyi en interlingvistiko kaj esperantologio." *Esperantologio / Esperanto Studies* 14, Nova serio 6: 28–44. <https://doi.org/10.59718/ees49781>

- Lindstedt, Jouko. 2006. "Native Esperanto as a test case for natural language." *SKY: Journal of Linguistics* 19: 47–55.
- Liu Haitao. 2011. "Quantitative analysis of Zamenhof's Esenco kaj estonteco." *Language Problems and Language Planning* 35, kajero 1: 57–81.
- PAG → Kalocsay kaj Waringhien 1980.
- Parkvall, Mikael. 2010. "How European is Esperanto? A typological study." *Language Problems and Language Planning* 34, kajero 1: 63–79.
- Piron, Claude. 1977. *Esperanto: ĉu eŭropa aŭ azia lingvo?* Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio – traduko: "Esperanto: European or Asiatic language?" <http://claudepiron.free.fr/articlesenanglais/europeanorasiatic.htm>
- Planchon, Philippe. 2025. "Evoluo de la afiksoj kaj de ilia memstara uzo en Esperanto." *Esperantologio / Esperanto Studies* 14, Nova serio 6: 91–105. <https://doi.org/10.59718/ees74126>
- PMEG → Wennergren 2024.
- Rokicki, Ryszard. 1987. "Leksemstrukturaj aspektoj klasifiki la esperantan morfemaron." En *Studoj pri la internacia lingvo / Études sur la langue internationale / Studies on international language*, redaktis Michel Duc Goninaz, 91–106. Gent: AIMAV.
- Rokicki, Ryszard. 2022. *Enkonduko en la morfologion de Esperanto*. Kaliningrado: Sezonoj kaj Kaunas: Litova Esperanto-Asocio.
- Saussure, Ferdinand de. 2022. *Kurso de ĝenerala lingvistiko*. Esperantigis Fernando Pita. La Chaux-de-Fonds: Kooperativo de Literatura Foiro.
- Saussure, René de. 1910. *La Logika Bazo de Vortfarado en Esperanto*. Ĝenevo: Universala Esperantia Librejo.
- Schubert, Klaus. 1989. "Interlinguistics – its Aims, its Achievements, and its Place in Language Science". En *Interlinguistics. Aspects of the Science of Planned Languages*, redaktis Klaus Schubert kun Dan Maxwell, 7–44. Berlin: De Gruyter Mouton.
- Schubert, Klaus. 1993. "Semantic Compositionality. Esperanto Word Formation for Language Technology." *Linguistics* 31: 311–365. <https://doi.org/10.1515/ling.1993.31.2.311>
- Schubert, Klaus. 2015. "Word-Formation and Planned Languages." En *Word-Formation. An International Handbook of the Languages of Europe*, redaktis Peter O. Müller, Ingeborg Ohnheiser, Susan Olsen kaj Franz Rainer, vol. 3: 2210–2225. Berlin kaj Boston: De Gruyter Mouton. <https://doi.org/10.1515/9783110375732-036>
- Stria, Ida. 2015. "Esperanto as a Natural Language." *JKI (Język. Komunikacja. Informacja)* 10: 32–42. https://www.researchgate.net/publication/298412317_Esperanto_as_a_Natural_Language
- Szerdahelyi, István. 1976a. *Vorto kaj vortelementoj*. La Chaux-de-Fonds: Kultura Centro Esperantista kaj Kupio: Literatura Foiro.

- Szerdahelyi, István. 1976b. "La Esperanta morfemaro." En *Esperantologiaj kajeroj* 1, redaktis István Szerdahelyi, 61–117. Budapest: Tankönyvkiadó.
- Szerdahelyi, István. 2024. Elektitaj artikoloj, elektis, prilaboris kaj enkondukis Ilona Koutny. Poznań: Interlingvistikaj Studoj AMU kaj Rys.
- Waringhien, Gaston. 1959. *Lingvo kaj vivo*. La Laguna: Stafeto.
- Wells, John. 1978. *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio.
- Wennergren, Bertil. 2024. *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko*. Versio 15.5. <https://bertilow.com/pmeg/index.html> [= PMEG]
- [Zamenhof, L. L.] D-r Ĝesperanto. 1887. *Meždunarodnyj jazyk*. Varŝava: Kel'ter [presejo]. <http://data.onb.ac.at/dtl/7001741>
- Zamenhof, L. L. 1905. *Fundamento de Esperanto*. Paris: Hachette. <http://data.onb.ac.at/dtl/5424176>

Pri la aŭtoro

Ilona Koutny, emerita profesoro pri lingvistiko (hungararologio kaj esperantologio) en Adam-Mickiewicz-Universitato, Poznano (Pollando). Iama disĉiplo de István Szerdahelyi kaj lia posteulo en la Esperanto-fako de ELTE (1987–1995), Budapeŝto (Hungario). Fondinto kaj gvidinto de la Interlingvistikaj Studoj en AMU (1998–2024). Ŝi esploras la rilaton inter lingvo kaj kulturo, interkulturan komunikadon, esperantan lingvistikon, pragmatikon kaj leksikografion. Ŝi publikigis kelkajn librojn, vortarojn kaj multajn artikolojn en diversaj lingvoj.

Retadreso: ikoutny@amu.edu.pl

ORCID-numero: 0000-0001-7950-1470

About the author

Ilona Koutny, profesor emeritus of linguistics (Hungarian and Esperanto studies) at Adam Mickiewicz University, Poznan, Poland. Former student of István Szerdahelyi, and his successor in the Esperanto department at ELTE (1987–1995), Budapest, Hungary. Founder and director of the Interlinguistic Studies at AMU (1998–2024). She has conducted research on the relationship between language and culture, intercultural communication, Esperanto linguistics, pragmatics, and lexicography. She has published several books, dictionaries and many articles in different languages.

Über die Verfasserin

Ilona Koutny, emeritierte Professorin für Sprachwissenschaft (Hungarologie und Esperanto) an der Adam-Mickiewicz-Universität, Poznań (Polen). Ehemalige Studentin von István Szerdahelyi, seine Nachfolgerin am Esperanto-Fach der Eötvös-Loránd-Universität (ELTE), Budapest (Ungarn) (1987–1995). Gründerin und Leiterin der Interlinguistischen Studien an der AMU (1998–2024). Sie erforscht die Beziehung zwischen Sprache und Kultur, interkulturelle Kommunikation, Esperanto-Linguistik, Pragmatik und Lexikographie. Sie hat eine Reihe von Büchern und viele Artikel in verschiedenen Sprachen veröffentlicht.

Esperanto morphology

Abstract: In the linguistic description of Esperanto, morphology is especially important: on the one hand, the unchanging morphemes and the productive, regular word formation represent an advantage, but on the other hand, there remain hidden problems that esperantologists have long discussed and that may also be of interest to general linguistics, namely the infamous ‘root characteristics’ (of lexical items). The article provides an overview of the field of Esperanto morphology, from the definition and classification of morphemes through the problems of word formation (derivation and compounding) to word structure and the definition of word classes. The typological position of Esperanto among natural languages concludes the presentation. Various approaches to morphemes are analyzed, from those of Akademio de Esperanto and Szerdahelyi to the most recent one by Jansen. The author herself proposes a further development.

Keywords: Esperanto studies; morpheme classification; word formation; word classes; typology

Morphologie des Esperanto

Zusammenfassung: Bei der sprachwissenschaftlichen Beschreibung von Esperanto kommt der Morphologie eine besondere Bedeutung zu: Einerseits stellen die unveränderlichen Morpheme und die produktive, regelmäßige Wortbildung einen Vorteil dar, andererseits lauern hier jedoch auch Probleme, die von Esperantologen seit langem diskutiert werden und die auch für die allgemeine Sprachwissenschaft von Interesse sein könnten, nämlich der berüchtigte grammatische Charakter der Wortstämme. Der Artikel bietet einen Überblick über das Gebiet der Esperanto-Morphologie, von der Definition und Klassifizierung der Morpheme über die Probleme der Wortbildung (Ableitung und Zusammensetzung) bis hin zur Wortstruktur und der Definition von Wortklassen. Die typologische Stellung des Esperanto unter den natürlichen Sprachen rundet die Darstellung ab. Es werden verschiedene

Ansätze zu Morphemen analysiert, von denen der Akademio de Esperanto und Szerdahelyi bis hin zu den neuesten von Jansen. Die Autorin selbst schlägt eine Weiterentwicklung vor.

Schlüsselwörter: Esperantologie; Morphemklassifizierung; Wortbildung; Wortklassen; Typologie